La Universala Paco-interligo

Paco estas la spiro de nia spirito.
Ĝi fluas el interne de la profundo de nia estaĵo por refreŝigi, resanigi, inspiri.

Paco estas nia rajto.
Ĝia eterna ĉeesto ekzistas en ni kiel memoro de kie ni venis, kaj kiel vizio de kien ni sopiras iri.

Nia mondo estas en la mezo de ŝanĝo.
Dum jarmiloj, ni pripensis, rezonis kaj praktikis la ideon de paco. Tamen la kapablo subteni pacon evitas nin. Por preterpasi la limojn de nia propra pensado, ni devas agnoski ke paco estas pli ol la ĉeso de konflikto. Por ke paco moviĝu trans la supraĵo de la tero, ni devas konscii, kiel la grandaj filozofoj kaj gvidantoj antaŭ ni, ke ĉiuj homoj deziras pacon. Per ĉi tio ni agnoskas ĉi tiun veron, kiu estas universala. Nun la homaro devas deziri tiujn aferojn, kiuj faras pacon.

Ni asertas, ke paco estas ideo, kies tempo venis.
Ni alvokas la homaron stari unuigita, respondante al la bezono de paco. Ni vokas ĉiun individuon krei kaj kreskigi personan vizion por paco. Ni vokas ĉiun familion generi kaj nutri pacon en la hejmo. Ni alvokas ĉiun nacion kuraĝigi kaj subteni pacon inter siaj civitanoj. Ni alvokas ĉiun gvidanton, ĉu en la privata hejmo, ĉu en la domo de diservo aŭ en la laborloko, por esti vivanta ekzemplo de paco, ĉar nur tiamaniere ni povas atendi, ke la paco moviĝu trans la supraĵo de la tero.

Monda Paco komenciĝas en ni mem.
Ekestiĝanta de la spirito, paco serĉas esprimon per la menso, koro kaj korpo de ĉiu individuo. Registaro kaj leĝoj ne povas resanigi la koron. Ni devas superi ĉion, kio apartigas nin. Per donado de amo kaj respekto, digno kaj komforto, ni ekkonas pacon. Ni lernas ami niajn proksimulojn kiel ni amas nin alportante pacon en la mondon. Per ĉi tio ni engaĝiĝas al ĉi tiu nobla klopodo.

Paco unue estas animstato.
Paco donas la plej grandan ŝancon por kresko kaj lernado, kiu kondukas al persona feliĉo. Memdirektado antaŭenigas internan pacon kaj tial kondukas al ekstera paco. Ni ĵuras resanigi nin per pardono, dankemo kaj preĝo. Ni devontiĝas igi ĉiun tagon esti plenumo de nia potencialo, kaj homa kaj dia.

Paco estas aktiva, la movo de silento, de fido, de akordo, de servo.
Ĝi ne estas farita en dokumentoj, sed en la mensoj kaj koroj de viroj kaj virinoj. Paco estas konstruita per komunikado. La malferma interŝanĝo de ideoj estas necesa por malkovro, por bonfarto, por kresko, por progreso ĉu ene de unu persono ĉu inter multaj. Ni ĵuras paroli kun sagaco, aŭskulti kun egaleco, ambaŭ sen antaŭjuĝo; tiel ni ekscios, ke paco estas libereco en trankvilo.

Paco estas atingita de tiuj, kiuj plenumas sian parton de pli granda plano.
Paco kaj sekureco estas atingitaj de tiuj socioj, kie la individuoj kune laboras por servi la komunan bonon de la tuto. Paca kunvivado inter nacioj estas la spegulbildo de la interna trankvilo de la homo pligrandigita. Iluminita servado al nia proksimulo alportas pacon al tiu servanto, kaj al tiu ricevanto. Ni ĵuras vivi en paco akceptante verojn, kiuj validas por ni ĉiuj.

Pace vivi komenciĝas per pace pensi.
Ni staras sur la sojlo de paca kompreno. Ni kunvenas, la tuta homaro, junaj kaj maljunaj de ĉiuj kulturoj el ĉiuj nacioj. Ni ĵuras kune stari kiel civitanoj de la Tero sciante ke ĉiu demando havas respondon, ĉiu afero rezolucion. Dum ni staras, kunigitaj en komuna celo, ni ĉi-tie engaĝiĝas en penso kaj ago por ke ni povu koni la potencon de paco en niaj vivoj.
Paco estu kun ni laŭ ĉiuj manieroj. Paco Regu Sur la Tero.

translated by miko sloper; proof-read by Giridhar Rao